

Monata revuo de la grupo Brugge

Sekcio de Flandra
Ligo Esperantista

Prezidanto: Drs F. ROOSE, J. & M. Sabbestraat, 12, Brugge.
Sekretariejo: ROOSE-DE KERSGIETER, J. & M. Sabbestraat, 12, Brugge.
Propagando: MAERTENS Gr., Nieuwstraat, 54, Assebroek.
Poŝtkonto: 291429, Maertens Gr., Assebroek.

MULTE DA LUNOJ.

Iutempe, en reĝlando apud la maro, vivis malgranda princino, nomita Lenore. Ŝi havis dek jarojn, iĝonta dek-unu. Unu tagon, Lenore malsaniĝis pro tromanĝado de frambotortoj kaj enlitiĝis.

La reĝa kuracisto venis ekzameni ŝin, mezuris ŝian temperaturon, palpis ŝian pulsobatadon kaj elŝovigis de ŝi la langon. Zorgoplena, li venigis la reĝon, la patro de Lenore, kaj la reĝo venis por vidi ŝin.

"Mi volus doni al vi kion ajn vi deziras": diris la reĝo. "Ĉu estas io, kion via koro deziras?"

"Jes": diris la princino. "Mi volas la lunon. Se mi povus havi la lunon mi ree estus sana."

Poste la reĝo iris al la tronsalonego, tiris sonorilkordon, -tri longaj tiroj kaj unu mallonga- post kiam tuj la eminenta ĉefĉambristo eniris. Li estis alta, korpulenta homo kun dikaj okulvitroj, kiuj ŝajnis liajn okulojn du fojojn pli grandaj ol ili efektive estas.

"Mi bezonas vin por ekhavigi la lunon al princino Lenore": diris la reĝo. "Se ŝi povus havi la lunon, ŝi ree estus sana. Alportu ĝin hodiaŭ vespere, morgaŭ plej malfrue." La ĉefĉambrista Moŝto frotetis sian frunton per naztuko, purigis poste brue sian nazon.

"Mi havigis al vi multe da aĵoj dum mia tempo, Via Reĝa Moŝto"; li diris. Li elpoŝigis longan rulon da pergameno. "Ni foje ekzamenu." Li alrigardis liston, sulkigante la frunton. "Mi havigis eburon, simiojn kaj pavojn, rubenojn, opalojn kaj smeraldojn; nigrajn orkideojn, rozkolorajn elefantojn kaj bluajn pudelojn; kolibrilangojn, anĝelplumojn kaj sciurmiron, funton da butero, du dekduojn da ovojn kaj sakon da sukero - bedaŭrinde, mia edzino enskribis ĝin."

"Ne utilas tio" diris la Reĝo. "La lunon mi bezonas nun."

"La luno": diris la ĉefĉambrista Moŝto "ne akireblas". "Estas je 35.000 miloj distanco kaj ĝi estas pli ampleksa ol la ĉambro en kiu kuŝas la princino. Plie, ĝi estas konstruita per fandita kupro. Mi ne povas havigi la lunon al vi. Bluajn pudelojn, jes, ne la lunon."

La Reĝo enkoleriĝis, ordonis lian ĉefĉambristan Moŝton foriri el la ĉambro kaj venigis al si la Reĝan sorĉiston. La Reĝa sorĉisto estis malalta, maldika viro kun longaforma vizago. Li portis altan, ruĝan, pintan ĉapelon, kovritan per arĝentaj steloj, kaj longan, bluan mantelon, kovritan per oraj strigoj. Li tre paliĝis kiam la Reĝo diris al li ke li bezonas la lunon por sia juna filino, kaj ke li atendas ke la Reĝa sorĉisto akiros ĝin.

"Via Reĝa Moŝto": li diris. "Mi multe sorĉis dum mia servotempo. "Hazarde mi havas en la poŝto liston de la sorĉaĵoj, kiujn mi plenumis por vi. Ekzamenu ni. Mi elpuŝis sangon el napoj, kaj napojn el sango. Mi konstruis kuniklojn per arĝentaj ĉapeloj kaj arĝentaj ĉapelojn per kunikloj. Mi ekstarigis florojn, tamburinojn kaj kolombojn per nenio kaj nenion per floroj, tamburinoj kaj kolomboj. Mi havigis al vi divenstangojn, sorĉbastonojn kaj kristalajn sferojn, en kiuj oni povas konsideri la estontecon. Mi pretigis por vi propran miksajon de lupveneno, noktombro kaj aglolarmoj por fortenti sorĉistinojn, diablojn kaj aĵojn, kiuj puŝrenkontas dum la nokto. Mi donis al vi sep-majlajn botojn, la origilon kaj malvidebligmantelon.

"La malvidebligmantelo ne funkciis" diris la Reĝo "ĉar mi, kiel ĉiam antaŭe, puŝrenkontis aĵojn." "La malvidebligmantelo estas supozata

malvidebligi vin" diris la Reĝa sorĉisto. "Oni ne povas postuli ke ĝi malhelpas tuŝrenkonti aĵojn." Li denove alrigardis sian liston. "Mi havigis al vi kornojn de elfujo, sablon de la dormigulo kaj oron de la ĉielarko. Ankaŭ fadenbombenon, pinglopaperon kaj pecon da vakso - bedaŭrinde, tiuj estas aĵoj, kiujn mia edzino enskribis por havigi al ŝi."

"Mi nun bezonas vin por ke vi havigu al mi la lunon" diris la reĝo. "La princino Lenore bezonas la lunon kaj kiam ŝi havos ĝin, ŝi ree estos sana."

"Neniu povas ekhavi la lunon kaj diris la Reĝa sorĉisto. "Ĝi estas je 150.000 mejlojn distanco, estas konstruita el verda fromaĝo kaj ĝi estas du fojojn pli granda ol tiu palaco."

La Reĝo ree enkoleriĝis kaj resendis la Reĝan sorĉiston al lia kavo. Poste li venitis la Reĝan matematikiston, kalvan, miopan personon, havante ŝvitĉapelon sur la kapo kaj krajonon malantaŭ la orelo.

"Mi ne bezonas aŭdi longan liston pri ĉiuj aferoj, kiujn vi kalkulis por mi de post 1907": diris la Reĝo al li. "Mi volak ke vi tuj kalkulu kiel ĝi estus ebla havigi la lunon al la Princino Lenore."

"Mi estas feliĉa ke vi menciis ĉiujn aferojn, kiujn mi kalkulis por vi de post 1907" diris la Reĝa matematikisto. "Hazarde mi momente havas liston pri ili kun mi. Mi kalkulis por vi la distancojn inter la kornoj de dilemo, inter nokto kaj tago kaj inter A.kaj Z. Mi kalkulis la distancon de "Sur"; kiom da tempo oni bezonas por iri al "For" kaj kio iĝas "Irinta". Mi malkovris la longecon de la marsserpento, la prezon de la "Senprezo" kaj la areo de la hipopotamo. Mi scias kie vi estas je ses kaj sep,; kiom da "estas" vi bezonas por havi "esti" kaj kiom da birdoj vi povas kapti per la salo en la oceano -187,796, 132- se interesas vi scii ĝin."

"Ne estas tiuj multaj birdoj" diris la Reĝo. "Ĉiokaze estas la luno, kiun mi bezonas nun."

"La luno distancas 300.000 mejlojn" diris la Reĝa matematikisto. "Ĝi estas rondforma kaj plata kiel monero, cetere ĝi estas konstruita de asbesto kaj embleksas kiel la duono de via Reĝlando. Flie ĝisestas gluita sur la firmamento. Neniu povas akiri la lunon."

Denove la Reĝo enkoleriĝis kaj forsendis la Reĝan matematikiston. Poste li sonorile venigis la Kortego-arlekenon, kiu kun ĉapo kaj sonoriloj salteniris.

"Kion mi povas fari por vi, Via Moŝto?"

"La Princino Lenore ŝatas havi la lunon" diris la reĝo funebroplene "kaj ŝi nur ree povas esti sana se ŝi havus ĝin, sed neniu povas havigi ĝin."

"Vi nur povas ludi por mi ion per via fluto. Io malĝoja." "Kiun amplekson ĝi havas kaj kia estas la distanco laŭ ili" demandis la Kortego-arlekeno.

"La ĉambristestro diras ke la distanco estas 35.000 mejloj kaj ke ĝi estas pli ampleksa ol ĉambro de Princino Lenore" diris la reĝo. "La reĝa sorĉisto diras ke ĝi troviĝas je distanco de 150.000 mejloj kaj ke ĝi estas du fojojn pli ampleksa el tiu palaco. La reĝa matematikisto diras ke ĝi havas distancon de 300.000 mejloj kaj ke ĝi ampleksas kiel la duono de nia reĝlando."

La reĝa arlekeno dum iom da tempo ludis per la fluto. "Ili estas ĉiuj saĝaj homoj," liddiris "kaj ili ĉiuj certe estas pravaj. Se ili estas ĉiuj pravaj, tiel la luno devas esti tiel ampleksa kaj je tioma distanco kiel ĉiu persono kredas ke ĝi estas. La problemo estas ekscii la distancon kaj la amplekson de la luno laŭ la pensado de la Princino." "Mi neniam pripensis tion" diris la reĝo. "Mi volas iri al ŝi por demandi ĝin, Via Reĝa Moŝto."

La princino Lenore estis feliĉa vidi la Kortego-Arlekenon, sed ŝia vizaĝo estis tre pala kaj ŝia voĉo tre malforta.

"Ĉu vi kunportis la lunon al mi": ŝi demandis. "Ne ankoraŭ": diris la Kortego-Arlekeno, sed mi tuj akiros ĝin por vi. Kiun amplekson ĝi havas laŭ vi?"

"Estas precize iom pli malgranda ol mia dikfingroungo": diris ŝi, "ĉar kiam mi direktas mian dikfingro-ungon paralele kun la luno, ĝi ĝuste kovras ĝin."

"Kaj je kiu distanco ĝi estas": demandis la Kortego-Arlekeno?"

"Ne estas tiel alta kiel la granda arbo, ekstere de mia fenestro" respondis la princino "ĉar ĝi ofte kaptiĝas en la pinto-branĉo."
"Mi supreniros sur la arbo, kiam la luno kaptiĝas en la pinto-branĉoj kaj portos ĝin al vi" diris la Reĝo-Arlekeno. Tiam li pripensis ion alian. "Per kio estas konstruita la luno, princino?" li demandis. "Ho" ŝi diris infane "estas kompreneble konstruita per oro".
La Kortego-Arlekeno iris al la Reĝa orajisto kaj ordonis lin konstrui etan, oran lunon, ĝuste iom pli malgrandan ol la dikfingroungo de la Princino Lenore. Poste li ordonis fiksigi ĝin ĉirkaŭ la kolo. Tiel ke al la princino estos ebla pendigi ĝin ĉirkaŭ la kolo.
"Kio estas tio, kion mi konstruis?" demandis la Reĝa orajisto. "Vi konstruis la lunon" respondis la Kortego-Arlekeno. "Tio estas la luno?" diris la Reĝa orajisto. "Sed la luno troviĝas je distanco de 500.000 mejloj, estas konstruita per bronzo kaj estas rondforma kiel ludglobo." "Tion kredas vi" diris la Kortego-Arlekeno forirante kun la luno. La Kortego-Arlekeno portis la lunon al la Princino kiu ĝojegis. La postan tagon ŝi ree estis sana, povis leviĝi kaj iri por ludi en la ĝardeno. Sed la reĝo sciis ke la luno dum la proksima nokte denove lumos kaj se la princino vidos ĝin, ŝi rimarkos ke la luno, kiun ŝi portas per kateno ne estas la vera. Tial li diris la Ĉambriestrea Moŝto: "Ni devas malhelpi ke la Princino dum la proksima nokto vidos la lunon. Pripensu ion."
Lia ĉefĉambrista Moŝto frapetis per la fingroj sian frunton. "Ni povas konstrui malheligajn okulvitoojn por la Princino." Tio tre kolerigis la reĝon. "Se ŝi portus malheligajn okulvitrojn, ŝi tuŝrenkontus aĵojn" li diris "kaj tiam ŝi ree estos malsana". Poste li enigis la reĝan sorĉiston, kiu staris sur siaj manoj, poste sur sia kapo, sekve denove sur siaj piedoj.
"Mi scias kion ni povas fari" li diris. "Ni povas etendigi per fostoj nigran veluran kurtenon, kiu kovras la tutan palacon kiel cirko-tendon" Tiel kolera nun estis la reĝo, ke li ĉirkaŭsvingis la brakojn. "Nigraj kurtenoj" li diris "fortenas la aeron kaj la princino Lenore ree estos malsana." Li venigis la reĝan matematikiston. La reĝa matematikisto ĉirkaŭiris laŭ cirklorondon, poste laŭ kvadrato; sekve haltis. "Mi scias" li diris.
"Ni povas fari artfajraĵon en la ĝardeno, ĉiun nokton. Ni konstruos aron da arĝentaj fontanoj kaj oraj kaskadoj. Funkciante ili plenigos la aeron per tiom da sparkoj ke estas tiel hela kiel dum la tago kaj al Princino Lenore ne estos eble vidi la lunon." La reĝo tiel enkoleriĝis ke li kuris tien kaj reen.
"Fajraĵoj vektenos la princinon" li diris "kaj ŝi ree estos malsana." Tial li resendis la reĝan matematikiston. Kiam li denove levis la okulojn, estis ekstere malhele kaj la brila lumo de la luno ĵus aperis ĉe la firmamento. Li tre ektimis kaj sonorvenigis la korteg-arlekenon. "Ludu por mi ion tre malĝojan" li diris ĉar se la princino vidos la lunon, ŝi ree estos malsana." La kortego-arlekeno ion flutludis. "Kion diras viaj saĝuloj?" "Ili ne povas eltrovi manieron por kovri la lunon sen malsanigi la princinon" diris la reĝo.
La kortego-arlekeno ludis alian kanton tre dolĉe. "Se viaj saĝuloj ne povas kaŝi la lunon, tiam ĝi ne povas esti kaŝita" li diris. "Sed kiu povis klarigi la manieron por akiri la lunon? Estis la princino Lenore. Tial princino Lenore estas pli saĝa ol viaj saĝuloj kaj scias pli pri la luno ol ili. Tial mi demandas ĝin al ŝi." Kaj antaŭ ol la reĝo povis haltigi lin li trankvile eliretis la tronsalonegon kaj supreniris la larĝan marmaron ŝtuparon al la dormo-ĉambro de Lenore. La princino estis en lito, sed ŝi vekis kaj elrigardis la fenestron al la luno; kiu lumas en la firmamento. Brilis en ŝia mano la luno, kiun la kortego-arlekeno havigis al ŝi. Li aspektis tre malgaja kaj ŝajnis larmoj en liaj okuloj.
"Rakontu al mi Princino Lenore" li diris funebre "kiel estas eble ke lumas la luno en la firmamento, kiam ĝi pendas al ora kateno ĉirkaŭ via kolo?" La princino rigardis al li kaj ridis. "Tio estas facila" ŝi diris infane. "Kiam mi perdas denton, nova kreskas anstataŭe, ĉu ne?" "Kaj kiam la reĝa ĝardenisto tondas la florojn en la ĝardeno, aliaj floroj aperas por anstataŭi ilin."

Grupa Vivado.

En la komenco de Januaro okazis la ĝenerala jarkunveno. Pro la pligrandiĝo de nia grupo kaj la disvastigo de ĝia laborkampoj ni devis elekti 9 estraranojn. Jen la nova estraro:

- 1) Prezidanto: Drs F. Roose.
- 2) Sekretariino: Henriette De Kersgieter.
- 3) Vic-prezidanto: Etienne De Baets.
- 4) Propagandestro: Grég. Maertens.
- 5) Bibliotekisto: André Claeys.
- 6) Kasistino: M.Th.Roose.
- 7) Festdirektorino: G. Mallet.
- 8) 1e Konsilanto: A. Van der Donckt.
- 9) 2e Konsilanto: Carlos Braet.

Kelkajn tagojn poste la nova estraro kunvenis kaj elektis kiel helpkomitatanojn: Willy Isselée, Miel Stalpaert, Gilberte Maertens kaj Gilbert Bruyneel. Dum tiu ĝenerala jarkunveno ni aŭdis raportojn pri la kaso, la propagando, la biblioteko, la studado, la revuo, kaj la grupa vivado. La prezidanto longe paroladis pri la nuna tempo kaj la situacio de Esperanto en ĝi (vidu "Paĝo de la E° movado" en la Februara N° 1946). Estis noktmezo kiam ni hejmen...kuris!

La postan ĵaŭdon ni havis Zamenhofvesperon. Tre belan deklamon ni aŭdis de nia juna kaj jam meritplena membrino Rosa Jurion. Deklamis kaj laŭtlegis ankaŭ Grég. Maertens kaj Et. De Baets. La prezidanto paroladis pri la vivo kaj la ideoj de nia majstro. La brulanta hejtilo disvastigis teruran...malvarmon! Kiel estas eble ĉu ne?! Nu, demandu al F.Vernimme...kaj ankaŭ al Rosa Jurion kiu kaptis frostiĝon apogante sur la tubo! Ni varmigis nin iomete alimaniere. La domestrino povis tion konstati vidante du rompitaĵajn vitrojn kaj la karbojn etenditaĵajn sur la planko. Jes, tiel efikis la pacaj ideoj de Zamenhof sur la gemembroj de "Paco kaj Justeco"!! Pais à part ça, tout va très bien! Ni havas nun alian ejon. Ĝi estas multe pli bela, pli vasta kaj ni povas salti sen ke la tuta domo tremas. Post du aŭ tri kunvenoj, estis jam kelkaj rompitaĵaj seĝoj kaj unu rompita tablo. Sed ĉar A.C.kaj F.V. restis ± trankvilaj dum la lastaj semajnoj, ni rajtas supozi ke tiuj mebloj estis jam tiaj antaŭ ol ni alvenis.

Ni devas plendi pri malvigliĝo en la grupo. Estas normale ke tio venas de tempo al tempo, sed tio ne povas daŭri. Ni ne kapablas ion serioze kaj ĝisfunde fari en la laborkunvenoj. Ankaŭ la revuo atendas ankoraŭ ĉiam kunlaboradon. La prezidanto estas tre kontenta pri la kurso. Ĉirkaŭ 15 venas tre regule kaj promesas iĝi bonaj geesperantistoj. Multaj studentoj estas inter ili kaj ŝajnas ke ili estas batalpretaj por nia idealo. Tiel nia grupo restas juna.

Ni havis duan publikan hipnotisman vesperon, kaj ni esperas ke baldaŭ ni povos aranĝi aliajn.

Ni nun ankaŭ komencas al la organizo de la kongreso.

Ni recenzas.

Donald W. Munns "Londona idoj" The Esperanto Publishing Coy LTD.
Heronsgate Rickmansworth Engl. 98 paĝoj. broŝ. prezo: 2 ŝ.67


"Apenaŭ kredeble ke estas knabo 14 jara kiu skribis tiun romanon pri knabaj aventuroj. La stilo ja ne estas tiel simpla kaj la vortkunmetaĵoj ankaŭ pensigas pri plenkreskula vortformigo. Ekz."inecaĉulo". Rimarkinda estas ankaŭ la manko de eraroj. Ĉu iu plibonigis? Ni tamen ne volas diri ke la legado estas malfacila, tute ne. Kiel ofte okazas, ankaŭ tie ĉi la uzoj de kelkaj prepozicioj estas diskutibla. Ekz."Li estas nia spertulo ĉe konstitucioj" (p.55). Ni tamen rekomendas. Multaj ĝuos la legadon.

La enigmo de la floro.

Horizontale:

1. laute voki (R); 2.eklezia altrangulo (R). 3.oni havas ĉe vulkanoj.
 4.respektoplena al Dio(R) - manĝebla kaj ornata herbo (R). 5.prefikso -
 korta naĝbirdo - infektega kaj ofte mortiga malsano (R). 6.dependiga
 konjunkcio - aro de stratoj kaj domoj (R) - marĉa birdo (R). 7.sufikso
 - skribi memorigan resumon - la ĉiupovanto. 8.helpverbo en la in-
 ferativo - malgranda - mara mambesto (R). 9.entera loko (R) - la sta-
 tuoj de in organizo aŭ societo (artikolo + vorto) 10.ekzemplo (R) -

- 1
- 2
- 3
- 4
- 5
- 6
- 7
- 8
- 9
- 10
- 11
- 12
- 13
- 14
- 15
- 16
- 17
- 18
- 19
- 20
- 21
- 22
- 23
- 24
- 25
- 26



senti impreson de surprizo (R) - manĝebla radikoj. 11.infanlito -
 ŝtato de Azio. 12.malhumile postuli (R) - prepozicio antaŭ la mezur-
 vortoj - speco de rimeno (R). 13.elfandi feron, verŝante ferminajon
 kun karbo en specialajn formegojn (R) - virino (R). 14.ricevatesto(R)
 - persona pronomo. 15.ne ĉi-tie - prepozicio de loko.16.kaptilo (R)-
 metalo (R). 17.komerca skriba kalkulo pri ŝuldoj aŭ havaĵoj - komencli-
 teroj de la antaŭnomo kaj familinomo de famkonata franca Esperanto
 verkisto. 18.restaĵo el disfalinta konstruo (R) - prepozicio - flanko
 de konstruaĵo (R). 19.refaldita bordero ĉe vesto (R) - konjunkcio -
 fari ion el nenio (R). 20.posteulo (R) - parteto (R) - marfiŝo kies
 supra mezkelo plilongigas en forno de spado. 21.metaloj (R) - venas
 foje post leterfiniĝo - sciencisto pri la spiritaj fenomenoj (R).
 22.malsana (R) - parto de la kapo - sufikso sen definitiva senco. 23.
 nonkesto (R) - respondo farita je nomo de ia diaĵo pere de ĝiaj pa-
 stroj. 24.sange ruĝa koloro (R). 25.spongeca bruligebla substanco.
 26.sovaga celerio (R).

